N-o 6.

# BULTENO

1937.
9. XII.

## DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.

*Redakcio kaj administracio:*
*Praha XIX., Uralské nám. 447.*
*Telefono n-ro 718-41.*

*Redaktas :*
*ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de*
*Esperanto-Asocio en ĈSR.*
*Aperas sesfoje dum la jaro.*

**T. G. MASARYK**

7. III. 1850 – 14. IX. 1937.

Ankaŭ por ni, esperantistoj, li estas modelo: precipe pro sia fido al nekonataj eblecoj de la homa intelekto. Kaj pro ekzempla persisto en batalo por la vero.

## Prunto por nia komerca entrepreno.

Ni sukcesis ricevi de la landofico en Praha librovendistan koncesion. Ĝi ebligos al ni pli sisteme organizi vendadon de libroj kaj eldonon de diversaj propagandiloj tre bezonaj kaj tre uzeblaj. El tio laŭ nia firma konvinko rezultos gajno, kiu signifos daŭran financan fonton por nia agado. Sed por povi labori en tiu sfero sur pli vasta bazo, ni nepre bezonas entreprenan kapitalon. Por krei ĝin, nia komitato

**decidis turni sin al ĉiuj bonvolaj amikoj de la movado kun peto pri prunto.**

Ni malfermas hodiaŭ kolekton de tiu entreprena prunto kaj deklaras jenajn kondiĉojn:

Ni akceptos prunton de niaj membroj en tuta sumo da Kč 10.000·—.

La prunto estos akceptata po Kč 100·— kaj ĝiaj obloj.

Ĉiu pruntinto ricevos konfirmon por ĉiu cento da kronoj.

La pruntita sumo estos administrata de 3-membra komisiono delegita de la Asocia komitato.

La ŝuldatestoj estas skribitaj je la nomo de pruntinto kaj estas ĝireblaj. Iliaj posedantoj ricevos 3% rentumon. Krome ili rajtas aĉeti eldonaĵojn de la Asocio kun 20% rabato ĝis duobla prezo de posedataj ŝuldatestoj. La prunto estos repagita dum 5 jaroj per lotumado, ĉiun jaron 2000 Kč.

Ni turnas nin al ĉiuj amikoj de la movado, ke ili partoprenu en tiu ĉi prunto. Precipe ni petas samideanajn klubojn, ke ili bonvolu mem prunti siajn kapitalojn por tiu ĉi celo kaj ke ili petu lokajn samideanojn dediĉi por tiu ĉi celo kelkajn kroncentojn.

**Komitato de EAĈSR.**

# KRONIKO ESPERANTISTA EN ČSR.

**Urbestro de Plzeň - membro de EAČSR.** Luděk Pik, urbestro de la progresema urbo Plzeň, aliĝis per Esperantista klubo en Plzeň al la Asocio. Kun ĝojo kaj sincere ni bonvenigas sinjoron urbestron kaj esperas, ke kun li ni plí bone iros antaŭen al nia celo.

## Antaŭkongreso en Praha.

Speciala komitato konsistanta el s-roj Bloch, Ginz, Hromada, D-ro Pitlík, Slavík kaj Šustr kaj reprezentanta bone la esperantistaron ĉefurban, preparis por la antaŭkongresaj tagoj 5-a kaj 6-a de aŭgusto nunjara sukcesintan aranĝon en Praha. Kvankam la invito okazis per nemultaj publikaĵoj, alvenis al Praha tamen preskaŭ 200 samideanoj el Aŭstrio, Estonujo, Francujo, Italujo, Jugoslavujo, Litovujo, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Svedujo kaj Svislando, kun la esperantistoj enlandaj sume el 12 ŝtatoj. Sekvis nian alvokon ankaŭ samideanoj ĉeĥoslovakaj, kiuj — aŭ kunveturis poste al la Varsovia kongreso aŭ — plejparte — devis kontentiĝi per ĝuo de la kvazaŭkongresa atmosfero de la du tagoj en Praha. Same estis pri niaj amikoj litovaj, kiuj — ne ricevinte enirpermeson de la kongreslando — venis al Praha premi la manojn de samideanoj diverslandaj. Kun ĝojo ni aŭdas hodiaŭ, ke verŝajne ĉiuj estis kontentaj.

La senpretenda interkonatiĝa vespero 5-an de aŭg. en speciala halo de kafejo Louvre fariĝis plej agrabla okazintaĵo, longe restonta en la memoro de la venintoj. La neentruda muziko, kelkaj mallongaj sed brilaj filmoj, disponigitaj de la komerca ministerio, restigis al ĉiu ankoraŭ sufiĉe da okazo por interkonatiĝo kaj interŝanĝo de ideoj. Kaj same la dua tago, la 6-a de aŭgusto, estis saturita de plej amikaj sentoj. Matene okazis la oficiala antaŭkongresa kunveno, dum kiu post saluto de la gastoj eksterlandaj kaj de la ĉeĥoslovakoj de ĉeĥa kaj germana lingvo el diversaj lokoj, parolis brile samideano Julius Glück pri la jubileo esperanta kaj aldonis kelkajn personajn rememorojn pri la Majstro. F-ino Charlet el Francujo estis lotumita inter la ĉeestantaj eksterlandanoj kaj ricevis donace de la Antaŭkongresa komitato lukse binditan Ĉeĥoslovakan Antologion.

Sendube interesis la gastojn ankaŭ la urbo montrita posttagmeze dum rondvojaĝo. En la urbodomo post meto de florkrono ĉe tombo de Nekonata soldato ilin bonvenigis la vicurbestro Tilínek per varmaj vortoj. Multaj venis al la kunvenejo ankaŭ vespere post la komuna tagmanĝo.

La gastigantoj havis la impreson, ke ili sukcesis en sia intenco: prepari du agrablajn tagojn al ĉiuj venintaj amikoj. La disiĝo, inter iuj nefacila, kaj la nun venantaj leteroj konfirmas tion.

Estis kvazaŭ provo por Universala kongreso kaj tiu provo bone sukcesis.

**Esperanto en Tutŝtata filatelia ekspozicio en Bratislava 24. X.—2. XI. 1937.** En tiu ĉi tre sukcesinta kaj tre ampleksa ekspozicio estis aparta tabulo tre alloge aranĝita de nia Asocio kun teksto (ĉeĥ-lingva): *Esperanto sur poŝtaj valorpresaĵoj. Esperanto-Asocio en ČSR.* Sur la tabulo estis tre sinoptike metitaj ĉiuj ĝis nun aperintaj oficialaj poŝtaj valorpresaĵoj, sur kiuj estas uzita Esperanto. Estas tie kompletaj serioj de poŝtkartoj Liechtensteinaj, Danzigaj, Brazilaj, Hungariaj, Aŭstriaj, Nederlandaj, Ĉeĥoslovakiaj, poŝtmarkoj, kartoj kaj kovertoj de USSR kaj la poŝtmarkoj de Brazilo, kun indikoj de koncernaj landonomoj. La aspekto de la tabulo tre atentigis pri si mem. Ĝi estis grava ne sole por propagando, sed ankaŭ por ĉiu esperantisto, ĉar neniam ĝis nun ni vidis egale kompletan kolekton, nek legis pri ĝi. Ĉar la ekspozicio havis grandan resonon en la publiko, multaj homoj vidis tiun ĉi dokumenton pri oficiala uzo de E-spo sur la poŝtaj presaĵoj.

### Konkurso por la legintoj de la Ĉeĥoslovaka Antologio.

Por vigligi intereson pri Ĉeĥoslovaka Antologio, okazigis Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko konkurson por la eksterlandaj legintoj de tiu grava verko. La tasko de la partoprenantoj estis indiki, kiun el la prozaĵoj aŭ poemoj de la libro ili trovas la plej bona, kaj koncize argumenti sian juĝon. Unua premio, 100 Kč kontante, estis lotumota inter tiuj respondintoj, kiuj estos voĉdonintaj por la verko, ricevinta la plej grandan nombron de la voĉoj. Dua premio, ankaŭ 100 Kč kontante, estis atribuota al tiu, kies valor-juĝon la juĝ-komisiono trovos la plej trafa.

La rezulto montris, ke ne regas unueca opinio inter la legintoj. Eĉ du respondoj ne koincidis reciproke. Tial la juĝkomisiono (konsistante el Šupichová, Slavík, Friedrich) atribuis la premiojn al du prijuĝoj, kiuj atestas, ke la partoprenintoj plej profunde penetris en la spiriton de la verko.

Estas: 1) S-o T. L. C. Bluett, South View, Cheswood Road, Worthing, Anglio, kiu balotis por „Kudrilo" de Šmilovský, kaj

2) S-ino Mathilde Gicquel, 28, Avenue St. Surin, Limoges, Francio, kiu balotis por la letero „El privata korespondado" de Božena Němcová.

EAĈSR zorgos pri represo de tiuj du valoraj prijuĝoj.

La Asocio jam forsendis la premiojn kaj gratulas al la premiitoj. La ceteraj voĉdonintoj ricevis po broŝuro pri Ĉeĥoslovaka Respubliko.

---

Pluraj raportoj el la Kroniko estas prokrastitaj en venontan numeron.

**ESPERANTSKÝ DOPISOVATEL**
de J. Šupichová Kč 12'80 afrankite.
Ampleksa libro (114 pĝ 13x18 cm), utila por ĉiu, kiu deziras esperantlingve korespondi.
Mendu tuj ĉe Libroservo de EAĈSR!

## Oficeja fondaĵo.

Dum la jaro 1937 pluraj grupoj kaj samideanoj rememoris tiun fondaĵon, kiu devas al ni faciligi la tenon de konstanta oficejo asocia. Tiu oficejo montriĝis nepre bezona, sed ni devas ĝin ankoraŭ pli bone instali kaj plilarĝigi, por ke ni povu en ĝin lokigi ĉiujn laborejojn de la Asocio kaj ke ĝi estu vere reprezentejo de la ĉeĥoslovaka movado esperantista.

Donacis dum la jaro 1937: Kč 200·— Esperantista klubo en Košice, Kč 100·— Esperantista klubo en České Budějovice, Kč 50·— s-ro Pialla-Lyon per s-ro Bloch por franca karavano antaŭkongresa, Kč 40·— Dro Č. Parma-Praha, po Kč 20·— Esperantista klubo en Mladá Boleslav, prof. Růžička-Holešov, Kč 15·— Esperantista klubo en Kolín, po Kč 10·— Esperantista klubo en Tisovec, ge-sroj Bloch, Buhr, Koutek, Průšová, M. Staněk, Vávrovský — ĉiuj el Praha, po Kč 5·— ges-roj Nydrle-Kladno, Barešová kaj Ter-Akopov el Praha, po Kč 4·— Bydžovský-Terezín, Řádek-Praha, Kč 3·50 Chladný-Vrútky, po Kč 3·— s-inoj Eckstein-Grenoble, Pirchan-Wien, sume Kč 547·50. Antaŭa sumo Kč 2673·30, ĝisnunaj donacoj entute Kč 3220·80.

Ĉiuj donacintoj ricevu sinceran dankon pro ilia kompreno. Estu tie ĉi esprimita la forta espero, ke anoncos sin novaj amikoj, kiuj deziras aktive kunlabori en la konstruo de la oficejo. La lokaj grupoj bonvolu meti en sian ĉiujaran budĝeton sumon dediĉotan al tiu ĉi grava celo.

**Mluvnica a slovník slovensko-esperantský** de J. V. Dolinský estas libro bezonata jam depost jaroj. Zorgu pri ĝia disvastiĝo! Mendu ĉe Esperanto-Asocio de ĈSR, Praha 47, sendante al ĝia poŝtĉeka konto n-ro 9602 aŭ 12.371 la sumon de Kč 19·60.

## Cseh-metodaj kursoj.

Cseh-metodo ne estas por ni plu problemo. Ni hodiaŭ konfesas, ke ni restis longe skeptikaj, sed nun ankaŭ ni, ĉeĥoslovakoj, spertis, ke tiu mirinda metodo alportas helpon ĉie, kie ne estis sukcesaj ĝisnunaj labormanieroj.

Se vi opinias, ke en via loko la movado ne iras sufiĉe vigle antaŭen, ne hezitu kaj provu Cseh-metodan kurson gvidatan de fremdlanda instruisto. La rezulto vin surprizos same kiel nin surprizis la unuaj kursoj gviditaj en nia lando. Inter la lernintoj de la pasintjaraj Cseh-kursoj estas hodiaŭ aktivaj novaj laborantoj kaj pluraj lertaj funkciuloj en lokaj grupoj.

Postulu detalojn t u j de nia komitatano s-ro prof. inĝ. L. Krajc, Mor. Ostrava-Vítkovice, Husitská 52. Se vi jam decidiĝis aranĝi la kurson, informu samtempe, kiam vi la kurson deziras havi, por kiom da tempo, kiel granda estas via urbo, kiom da anoj havas via grupo, kiom da kursoj po 30 personoj vi esperas aranĝi en via urbo, kiom da lernejoj havas via urbo, en kiuj kaj kiaj societoj povos esti prelegoj pri fremdaj landoj.

## Esperantista vivo.

**Mortis** s-ro Metoděj G o l d a, ĝendarma ĉefserĝento e. p., Brno-Král. Pole, ŝatata membro de la Esperantista klubo en Brno.

Mortis en marto 1937 s-ro Teodor S a m e t, nia amiko en Prostějov, membro de EK.

Mortis s-ro D-ro Václav D r t i n a, advokato en Beroun, malnova samideano.

Sinceran kondolencon al la familianoj!

## „E P O K O“ Libro-Klubo.

**Celo:** La EPOKO Libro-Klubo celas havigi al siaj membroj bonajn Esperantajn librojn por malalta prezo. Ĉiu scias, ke ju pli da libroj oni presas, des pli malalta estas la prezo. Ĉar oni ne povas esti certa, ke oni vendos multajn librojn, la kutima eldon-nombro de Esperantaj libroj estas malalta kaj pro tio la prezoj sufiĉe altaj. La aliĝo de multaj klubanoj indikos al ni, kiom da libroj oni presigu, kaj tiel ebligos la tre malaltan prezon.

**Kion membro ricevos:** Ĉiu membro ricevos libron, proksimume 200-paĝan, 18x11·5 cm, bone presitan kaj broŝuritan, por la malalta prezo de 10 Kč. La prezo de tiuj libroj al la ĝenerala publiko estos 20 Kč.

**Kiel aliĝi al la klubo:** Ne estas kotizo, sed nur enskribitaj membroj povos ricevi la librojn je la favora prezo. Por aliĝi al la klubo, vi bezonas nur plenigi ĉi-kunan aliĝilon, kaj sendi ĝin al EAĈSR. La libroj aperos po unu ĉiun duan monaton. Ĉiu membro konsentas akcepti la librojn dum minimume ses monatoj (tio estas tri librojn). Tuj post apero ili estos sendataj al EAĈSR, kiu peros ilin al siaj membroj. Al EAĈSR la membroj devos pagi.

**La unuaj libroj kredeble estos:**
1. Murdo en la Orienta Ekspreso . . Agatha Christie.
2. La Princo kaj Betty . . . . . . P. G. Wodehouse.
3. La Tempo-Maŝino . . . . . . . . . H. G. Wels.

ALIĜU NUN uzante la dorsan mendilon!

## Kartoteko pri la tradukaĵoj el la ĉeĥoslovaka lingvo esperanten.

La Asocio posedas ampleksan kartotekon (sliparon) pri la tradukaĵoj el la ĉsl. lingvo esperanten, publikiĝitaj aŭ en gazetoj aŭ memstare. Krome enhavas la kartoteko ankaŭ la tradukaĵojn, kiuj estas jam pretaj aŭ preparataj, sed ankoraŭ ne estas publikiĝitaj. Ni petas ĉiujn samideanojn, kiuj posedas proprajn tradukaĵojn aŭ preparas iun, sciigi nin pri tio, por ke ni enviciĝu respektivan noton en la sliparon. Se iu intencas traduki pli gravan verkon, demandu ĉe ni, ĉu eble iu alia ne faras jam la samon. Kiom da laboro oni povas per tio ŝpari! Imagu, ke la romano Psohlavci estas jam trifoje tradukita (kvankam ĝi nenie aperis), Bílá nemoc de Karel Čapek ankaŭ trifoje. Kaj tiuj ĉi kazoj ĉiam ripetiĝas.

De tempo al tempo turnas sin al ni diverslandaj redakcioj, petante materialon el ĉs. literaturo, taŭgan por publikigo. Helpe de la kartoteko ni povos elserĉi ĝin el la prespretaj tradukaĵoj. Indikojn laŭ la sliparo ni liveras al la ministerio kaj al multaj gravaj bibliotekoj. Ĝi ebligas ankaŭ sisteman laboron por enpenetro de nia literaturo eksterlanden. Kaj multaj aliaj gravaj uzoj ekzistas.

Ni insistas ankoraŭfoje: Uzu la servon de la literatura komisiono de la Asocio! Subtenu ĝin en la menciita maniero!

Krome ni petas komplezajn samideanojn, kiuj volus kunhelpi ĉe la kompletiĝado de la kartoteko; Ni bezonas traserĉi kaj esplori plurajn gazetojn (tutajn jarkolektojn), ekz. Heroldo de Esperanto, Esperanto triumfonta kaj aliajn. Kiu sin anoncos laborpreta, ricevos detalajn instrukciojn. La laboro estas tre facila, sed estas la kondiĉo, ke la bonvola samideano haviĝu al si mem (eventuale per prunto) la traserĉotajn jarkolektojn.

Skribu al la estro de la Literatura komisiono de la EAĈSR: JUDr. Tomáš Pumpr, ministerstvo vnitra, Praha-Hrad.

## Informoj.

**Lumbilda parolado pri Svedlando.** EAĈSR disponas pri serio de belaj diapozitivoj el Svedlando kaj pri teksto de parolado al tiuj bildoj. Kun nemulta klopodo estas tiel aranĝebla interesa kluba vespero. Niaj grupoj postulu tuj detalojn de la Asocio.

**Esperantista Komenský-festo en Naarden.** Laŭ instigo de nia eminenta samlandano prof. Julius Glück en Amersfoort estis aranĝata sub protekto de nia ambasadoro ministro Krno la 27-an de novembro 1937 en maŭzoleo de Komenský en Naarden festo, al kiu estis invitata la nederlanda esperantistaro. Post saluto de la oficialuloj (en la festa komitato estis gravaj personoj de nederlanda publika vivo) parolis prof. Glück: Pri Komenský kaj lia signifo por universala lingvo.

**Esperanto kaj Komerco,** societo por apliko de esperanto en komerco kaj industrio en Praha. Ĉeĥoslovakaj komercistoj esperantistoj dezirantaj kunlabori en tiu ĉi societo, bonvolu skribi al EAĈSR, Praha 47. Ili ricevos ĝustatempe informon pri la preparata ĝenerala kunveno.

**Respondkuponoj.** Ni havas ĉiam provizon de poŝtaj respondkuponoj kaj liveras ilin po Kč 3·25. Pro ŝparo de afranko postulu ilin samtempe kun alia mendo ĉe la Libroservo de EAĈSR.


## Senpage

dum 4 monatoj ni liveros al nova abonanto la plej interesan, amuzan kaj instruan gazeton **„Verda Revuo“**, se li pagos tutjaran abonprezon. Do, li pagosdekdu numerojn kaj ricevos

**16 numerojn!**

La gazeto estas riĉe ilustrita, simple skribita kaj aperas regule ĉiumonate. Tutjara abonprezo estas 22 Kč, pagota al EAĈSR. Abono komencebla ĉiumonate. Petu senkostan provnumeron de Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha 47.


## ALIĜILO al „EPOKO“ LIBRO-KLUBO

*Al Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha 47.*

Bonvolu enskribi min kiel membron de la „EPOKO“ Libro-Klubo. Mi konsentas regule akcepti la eldonotajn librojn, po unu Kč 10·—, dum almenaŭ ses monatoj, kaj poste ĝis mi sciigos al vi, ke mi deziras eksiĝi. Tiuokaze mi avertos vin unu monaton antaŭe. Mi konsentas pagi la prezon tuj post ricevo de ĉiu aparta libro al via poŝtĉeka konto n-ro 12.371. (Kompreneble, membro rajtas antaŭpagi kelkajn librojn por eviti sendkostojn rilate al la pago.)

Nomo: ..............................................................

Adreso: ..............................................................

.............................................................. Dato: ..............................

Bonvolu skribi per pres-literoj!

## Lokaj informoj.

*Asch.* 6. VI. partoprenis la loka grupo manifestacion ĉe la e-monumento en Frant. Lázně—Franzensbad, kiun organizis s-anoj de Plzeň. Ĉeestis 65 p.

*Bardejov.* A. Rauvolf kaj J. Vocl, instruistoj, organizis en la ŝtata burĝa lernejo ekspozicion de desegnaĵoj de japanaj kaj ĉinaj lernantoj. La plensukcesan entreprenon ebligis nur la uzo de e. La lerneja inspektorejo oficiale aprobis kaj helpis ĝin. Aperis artikoloj en kelkaj gazetoj pri ĝi.

*Boskovice.* 7. III. parolado de J. V. Šamla, Brno, dum festkunveno dediĉita al la naskiĝdatreveno de Prez. Masaryk, ekspozicio kaj provleciono. 14. III. malfermo de kurso kun 31 komencantoj instruataj de M. Ultmann, 18. III. malfermo de dua kurso por 28 komencantoj instruataj de R. Štěrba. Post ilia finiĝo restis 40 p., kiuj la 23. V. organizis ĝeneralan kunvenon por fondi lokan grupon de EAĈSR. La fondon antaŭiris kursfina festo kun bela programo enhavanta enketon „Kial mi lernis e-on". Oni elektis prez. R. Štěrba, vicprez. J. Valtr, sekr. A. Řehořek, kas. Fr. Hönig, bibl. J. Král. Regulaj kunvenoj okazas ĉiumerkrede je la 19·30 ĉe Fabianek, Sušilova třída. — 17. V. la novaj s-anoj ekskursis al la ĉirkaŭaĵo; nombro de partoprenintoj 24. Dum la ekskurso oni lernis La Esperon.

*Bratislava.* La sveda karavano de 12 fervojistoj estis akceptita 18. V. EK organizis Amikan Vesperon en restoracio, viziton al urbaj vidindaĵoj kaj ekskurson al Devín, por kiu estis senpage disponigita fervoja aŭtobuso (laŭ iniciato de vicprez. Charvát). — Por revivigi kaj konservi intereson de la membraro EK sendis en junio al ĉiuj pagantaj kaj ankaŭ jam delonge nepagintaj anoj kaj al multaj enskribitaj interesuloj detalan tripaĝan cirkuleron ciklostilitan. — Funkciis publika kurso por komencantoj de novembro ĝis junio. La metodo uzita estis interesa pro tio, ĉar ne instruis unu instruanto, sed organizita grupo, kies membroj alternis instruante laŭ la dekomence fiksita plano, kies bazo estas Ĉe-metoda lernolibro. La instruintan grupon estris E. Wanitsek kaj P. Rosa. (Similan metodon uzis foje ankaŭ EK Praha kun granda sukceso. Oni scias, ke ĝi estas metodo aplikata de granda lingvo-instituto, kiu sur ĝia bazo trovis firman ekzistadon.) — Somere la klubo kunvenadis krom merkrede ankaŭ ĉiuvendrede en la ĝardeno de la honora prezidanto E. Wanitsek. Por ebligi dimanĉajn kunvenojn dum la varmaj somertagoj oni en junio-julio-aŭgusto organizis „dimanĉejon" en la montaro super la Stollwerk-fabrikejo. — 20. VI. vizitis la urbon karavano de 260 s-anoj el Vieno. La aranĝon de la tradicia, ĉiujare ripetiĝanta ekskurso partoprenis ankaŭ „Slovenská rada pre cestovný ruch (Slovaka konsilantaro por fremdul-trafiko)".

*Brno.* 4. III. prezentis studento J. Sedláček paroladon pri „Zamenhof kaj Esperanto" kiel oficialan lernejan taskon en leciono de ĉeĥa lingvo, en la IVa klaso de la ŝtata gimnazio. — 14. III. ĝenerala jarkunveno de EK elektis jenan laborkomitaton: prez. Th. Kilian, vicprez. J. Hoffner, sekr-oj J. Vondroušek kaj J. Horák, kas. T. Borkovec, bibl. H. Šiprová. El la multenhava agadraporto 1936: regulaj kunvenoj de membroj ĉiusemajne, eĉ somere kun kreskanta nombro de ĉeestantoj, 8 stacidomaj tabuletoj, 211 raportoj al ĵurnaloj, 138 gazeteltranĉaĵoj pri e. Propagandaj kestoj de EK estas: unu en Brno-urbo sur kalejo Museum (prizorgas R. kaj A. Nečas), unu en Brno-Maloměřice (instruisto Jeřábek) kaj du en Židenice (R. Nečas). — Funkciis 3 publikaj kursoj kun sume 58 p., krome kurso en burĝa lernejo, alia en blindulejo kaj alia por skoltoj. Ilin gvidis T. Borkovec, Jelínková, J. Jeřábek, J. Vondroušek. Krom tio okazis 4 Ĉe-kursoj de H. Seppik kun 120 p. La kaso montris spezon de Kč 11.841·12, el kio restis je la jarfino Kč 1.529·— kluba havaĵo. — 8. V. Amika kunveno kun 60 p. por soleni la 50-jaran jubileon. Prelegis J. Vondroušek, recitis poemojn la juna s-anino Lotja Němečková, muzikon prezentis violonvirtuozo F. Mašek kaj Dro Raušal. Sekvis dancado. La feston ĉeestis rumanaj kaj jugoslavaj gastoj. — 17. VIII. Granda Fest-Vespero, kies artplenan literaturan programon prezentis la Steloj de la internacia e-movado, inter ili D-ro K. Kalocsay, kiu gvidis la aranĝon, Julio Baghy, Kola Ajayi, kiuj deklamis poemojn, L. Totsche, prezentinta poemojn kaj novelon „Kontraŭ la aŭroron", V. Bleier, raportinta pri la Univ. Kongreso en Varsovio, Rotkvić, Nikolao Hovorka, J. Major, kiu rakontis pri japana vivo kaj Ŝanhajo, k. a. Piano-muziko finis la programon. Ĉeestis pli ol 70 p., ankaŭ el Uherské Hradiště, Svitavy, Boskovice k. a. La Vespero vekis grandan atenton kaj aperigis multajn gazetartikolojn. — *Katolikoj:* 16. VIII. kunveno de ĉiuj membroj ĉe parolado de itala s-ano Profesoro Modesto Carolfi pri Italujo kaj Romo, kun lumbildoj. — Laboristoj. La nove fondita laborista e-societo aranĝis ku kursojn. La unua estis malfermita la 11. II. kun 28 p., la dua la 18. III. kun 36 p. Ambaŭ daŭris po 2 monatoj; instruis A. Jansa.

*Břeclav.* 19. III. ĝenerala jarkunveno elektis J. Poláček prezidanto, H. Mikolášková vicprez., R. Trojna kaj A. Vája sekr-oj, Fr. Svačina kaj Em. Vaculík kas-oj, F. Hlávka bibl, J. Holzerová prot., V. Hron kaj Fr. Kruták revizoroj. Del. de IEL estas A. Hrabálek. — En junio finiĝis kurso por 16 progresintoj. Gvidis St. Borovka, fakinstruisto. La kurson oni daŭrigos aŭtune, kiam ankaŭ kurso por komencantoj estos malfermata. E-Rondeto publikigis per gazetoj alvokon kun la celo kolekti eks-esperantistojn kaj amikojn de e. Ni esperas, ke la rezulto kontentigis la iniciatintojn de la bona ideo. Regulaj

kunvenoj rekomenciĝis la 7. IX. — 27.—28. IX. publika e-ekspozicio bone propagandata de la lokaj gazetoj. — 6. X. malfermo de aŭtuna kurso por 45 komencantoj. Gvidas St. Borovka. La rondeto havas 30 novajn membrojn kaj preparas publikan prelegon de Kola Ajayi.

*Doubrava.* 28. III. prelego de H. Seppik: Svedujo, la plej feliĉa lando de Eŭropo, la lando sen krizo. Lumbildoj kaj kantoj.

*Frenštát pod Radhoštěm.* Fondiĝis Rondeto de E-istoj, kiu regule kunvenas ĉiumerkrede je la 20a en hotelo Přerov.

*Frýdek.* 2. V. laborkunveno en hotelo Silesia, dum kiu oni adiaŭis H. Seppik forlasanta nian landon. Liaj junaj kursanoj prezentis unuaktan teatraĵon en e, kio pruvis la taŭgecon de lia Ĉe-metoda instruado.

*Hluk.* Februare ĝenerala jarkunveno, kiu elektis novan estraron, ĝi konsistas el J. Hala, F. Omelka, R. Borýsek kaj T. Sadílek. El la agadraporto: regulaj kunvenoj de ĉiuj membroj, prelegoj de ges-oj Seppik kaj J. R. Scherer, ekskursoj, instruado. La EK decidiĝis aliĝi al EAĈSR. — 13. IV. kursfina festo. — Gazetoj raportis, ke tie ĉi vivas la plej junaj e-istoj. Rudolfo Borýsek estas nur trijara kaj parolas kaj kantas en e. La kvarjara Sadílková deklamas senerare e-ajn poemojn.

*Hradec Králové.* 24. IV. Amika Vespero kun parolado, kantoj, muziko, deklamado, teatraĵo kaj danco. 70 partoprenintoj, kiujn oni regalis per teo kaj kukaĵoj donacitaj de klubaninoj. Dankon al ili kaj same al ĉiuj kunhelpintoj, precipe al la prez., Dro Weiner, al F. Pytloun, festoratoro, al f-inoj Hořejší kaj Tůmová deklamintaj, kaj al J. Kroutil, sub kies lerta estrado funkciis kordinstrumenta muzikistaro. Ĉeestis novaj s-anoj el la kursoj de H. Seppik kaj Fr. Pytloun.

*Hradečná apud Uničov.* En aprilo funkciis kurso por germanaj komencantoj. Ĝin gvidis Marko Jurič, kiu faras multan propagandon kaj varbas amikojn por e. en tiu ĉi nordmoravia loko.

*Hrachov apud Valašské Meziříčí.* En tiu ĉi malgranda vilaĝo laboras por e. Helena Frühaufová. Aro da fervoruloj de ŝi gvidataj deziras fondi EK-on.

*Chodová Planá—Kuttenplan.* En la stacidomo pendas, videbla el la traveturantaj vagonaroj, e-a informtabulo. Loka gazeto komencis publikigi e-informojn.

*Jablonec n. N.* — *Gablonz a. d. N.* La grupo „Isermontaro" aranĝis pentekoste sukcesplenan ekskurson. 29. VIII. aranĝis la Distrikta Asocio Reichenberg de GEL amikan kunvenon kaj ekskurson al tiu ĉi urbo kaj monto Bramberg.

*Jägerdörfel bei der Lausche.* 29.—30. V. okazis tie ĉi E-Tago de nordbohemiaj laboristaj e-istoj.

*Jaroměř.* 21. II. fermo de Ĉe-kurso gvidita de s-ino E. Seppik. Dum festo ĉi-okaza la kursanoj prezentis gajan teatraĵon kaj estis publike ekzamenataj. La ĉeestintaj neesp. aplaŭdis la sukceson de la kurso, precipe, kiam tradukis paroladon de la fremdlanda kursestrino G. Hrozný, scianta tute neniom esperanton nur unu semajnon antaŭe. — 14. V. okazis printempa vespera ekskurso al proksima belnatura ĉirkaŭaĵo. Regulaj e-kunvenoj estas ĉiuĵaŭde je la 19·30 en restoracio „U modré hvězdy"; la programoj konsistas ĉefe el e-instruado kaj konversacio. Ĝenerala jarkunveno okazis la 27. V.

*Jičín.* Pri la e-a aliĝo eldonita de la urbestraro raportis multaj gazetoj. 25. VII. regiona konferenco. La programo konsistis el Di-servo kun prediko kaj kantoj en e., komuna tagmanĝo, vizito al la regiona ekspozicio, kies e-fako, bone ekipita, vekis ĝeneralan atenton ĉe la publiko. La Di-servon permesitan de la eklezia aŭtorito, ĉeestis oficialaj reprezentantoj de la regiona festo, en kies kadro la E-Tago okazis. Partoprenis ĉeĥaj kaj germanaj s-anoj el 9 lokoj.

*Jilemnice.* La loka EK propravole disiĝis.

*Josefov.* Regulaj kunvenoj ĉiulunde je la 19·30 en hotelo „Otta", kun e-instruado, konversacio, prelegoj.

*Kolín.* 10. IX. rekomenciĝis regulaj kunvenoj de EK. Ili nun okazas la duan kaj kvaran vendredon ĉiu-monate, je la 20a, en hotelo „Lidový dům".

*Kopřivnice.* Tieaj skoltoj okupiĝas pri e. Ili deziras rilaton kun skoltaj s-anoj, kiuj skribu al R. Zaníška, Kopřivnice, Masarykova 87. — EK partoprenas vigle la movadon, kion pruvas la agadraporto por 1936. Okazis kurso por skoltoj, oficiala partopreno ĉe la monumento-inaŭguro en Lichnov kaj Scherer-parolado en Moravská Ostrava. Aŭtuna kurso por komencantoj havis 36 p.

*Košice.* La antaŭajn raportojn ni kompletigas per tio, ke la 3 Schererparoladojn en februaro aŭdis pli ol 700 p. — 7. IV. aranĝis EK en „Slovenský Národný klub" vesperon pri ĉehoslovaka kaj hungara literaturo. 14. IV. Memorfesto pri Zamenhof, kies programo enhavis interalie legadon el la libro „La lastaj tagoj de Zamenhof kaj la funebra ceremonio". Oni honoris la memoron al la Majstro per duminuta silento starante. 31. VIII. EK laborkunsidis kaj decidis organizi Ĉe-metodajn kursojn komenculan kaj perfektigan kaj publikajn paroladojn de Kola Ajayi kaj aliaj s-anoj.

*Kunovice.* 13. III. aranĝis la lokaj e-istoj la unuan E-Vesperon. Multnombre ĉeestis s-anoj el Uherské Hradiště kaj Hluk. Kurson en printempo gvidis Tichoň.

*Kutná Hora.* 1. X. malfermo de kurso. Instruas em. dir. A. Horáček.

*Lázně Bělohrad.* 25. VII. malfermo de Ĉe-kurso por e-instruantoj. Prelegis S. Pragano kaj Dir. Neužil.

*Liberec — Reichenberg.* Kurson por germanaj komencantoj kaj progresintoj gvidas Sup. Kons. Dro E. Gruber depost septembro.

*Luhačovice.* La banloka direkcio permesis al EK Brno lokigi publikan propagandan kaj informan keston ĉe la ĉefa promenejo. La keston, kiu funkcias depost majo, prizorgas Bůřil.

*Místek.* 27. VI. E-Festo, kies programon prezentis lernej-infanoj de Frýdek kaj Místek. La feston organizis EK Frýdek-Místek en Národní dům.

*Mladá Boleslav.* 31. V. vizitis la lokan EK fremdlanda s-anino, f-ino M. Clauwaert el Ostende, Belgujo.

*Mnichovo Hradiště.* 1.—2. V. okazis konferenco kaj ekskurso de nordbohemaj e-istoj. La bone organizitan kaj sukcesintan feston partoprenis 65 ĉeĥaj kaj germanaj s-anoj el 26 lokoj.

*Moravská Ostrava.* En la Salesiana Instituto funkciis de februaro ĝis junio kurso por 15 komencantoj. La malferman paroladon faris Inĝ. L. Krajc, instruis V. Slaný. En majo la novaj s-anoj fondis E-istan Grupon „Don Bosco", kiu havas fakon „Tablo-Tenisa Grupo E-ista", kiu tre verŝajne estas la unua kaj sola tiaspeca grupo en la mondo. La aranĝojn fermis festo kun literatura kaj muzika programo. — 21. III. REL-kunveno kun adiaŭa festo honore al s-ino E. Seppik. En aprilo funkciis ĉiulunde konversacia kurso gvidata de H. Seppik. 18. IV. kunveno dediĉita al H. Seppik antaŭ lia forveturo. 3. V. lokaj s-anoj grandnombre venis al la stacidomo por adiaŭi s-on H. Seppik. 9. V. propaganda ekskurso kaj kunveno kun s-anoj el najbaraj lokoj. El aliaj ekskursoj ni citu tiun de 13. VI., kiam oni per aŭtobuso veturis al monto Ĉantorio, por partopreni REL-laborkunvenon. — 28. VIII. vizitis EK-on nederlandaj ges-anoj, f-ino Plas kaj s-o Tenenbaum, kiu publike prelegis pri la utilo de e, de li dum vojaĝado spertita. La aŭtunan laboron rekomencis la anoj de EK per laborkunveno la 14. IX. en kafejo Faix, kie akazas regulaj kunestoj ĉiumarde je la 20a.

*Moravská Ostrava—Mariánské Hory.* 21. III. fonda kunveno de Societo de Laboristaj E-istoj, la unua laborista e-societo en tiu regiono. 30 membroj. Propra organo ĉeĥa-e. Ekspozicio okaze de la fondkunveno.

*Moravská Ostrava-Přívoz.* 16. III. malfermis e-kurson la „Laborista Akademio" (kleriga societo); instruis Vl. Slaný.

*Moravský Krumlov.* En marto funkciis kurso por 40 komencantoj. Ĝin gvidis M. Dubšík, instruisto.

*Nižkov na Polensku.* E-on instruis tie ĉi dum libertempa restado Groedl.

*Nové Zámky.* 18. IV. Festo okaze de la mortotago de Zamenhof. Ĉeestis 60 p., ankaŭ el Komárno kaj Parkan. La programo konsistis el prelegoj de Badin (pri e. kaj ĝia jubileo) kaj Kotoulek (pri 20-jara datreveno de la morto de Zamenhof); muziko kaj deklamado prezentita de 8- kaj 9-jaraj ges-anoj, de f-inoj Filová kaj Demuthová, s-oj Kerlész, Becska k. a. S-o Fabry, violonvirtuozo, prezentis memkomponitan „Funebran Kanton". Ĉi-vespere debutis kantista ĥoro de la klubo, estrata de Fabry, kun bona sukceso. La aranĝo estis samtempe kursfina festo. Okazis kurso por hungarlingvanoj kaj alia por slovaklingvanoj. La kursanoj transdonis dum la festo dankdonacojn al sia instruisto Kocsis. 19. V. vizitis la lokan grupon svedaj e-istoj. Ilin akceptis reprezentantoj de l'urbo, militistaro kaj fervojdirekcio, slovakaj kaj hungaraj societoj ktp. Vespere okazis komuna manĝo kaj festo kun riĉega programo en la loka Sokol-ejo. — 27. VI. vizitis la grupon, je ĝia invito, nederlanda fervoj-oficisto D. Burgler. Ankaŭ tiu vizito vekis multan propagandan atenton.

*Nový Bohumín.* 10. III. kursfermo kun 15 novaj s-anoj. Ĉi-okaza amika kunveno ekzamenis sub gvido de V. Slaný la scion de la kursanoj, post kio oni amike ĝisnokte interbabilis. — 24. IV. okazis prelego de H. Seppik pri Svedujo, „la lando sen ekonomia krizo". Ĝin sekvis fondo de loka grupo de EAĈSR.

*Olomouc.* 3. III. ĝenerala jarkunveno elektis jenan laborkomitaton: prez. Jar. Mastný, vicprez-oj D-ro Fr. Lédl kaj Dir. A. Neužil, 1a sekr. Bř. Pittner, 2a sekr. Fr. Mílek, kas. J. Brettschneider, bibl. Fr. Kuba. Regulaj kunvenoj okazas ĉiuĵaŭde en la urba legejo, placo Masaryk, je la 20a. — 27. V. ekskurso kun amika kunveno en Lázně Slatinice.

*Orlová.* 14. III. malfermo de Ĉe-kurso gvidata de H. Seppik. E-Rondeto „Emo" entreprenis la 27. VI. ekskurson kun sinbano en rivero en Špluchov (Doubrava).

*Petřvald.* Ĉe-kurson de H. Seppik partoprenis 50 komencantoj.

*Písek.* 27. IV. ĝenerala jarkunveno elektis jenan laborkomitaton: prez. K. Kolář, vicprez. F. Uhrová-Křivancová, sekr. Frolíková, kas. Chalupová. La grupo havas 13 membrojn, el tio estas 10 novuloj el la vintra kurso. Regulaj kunvenoj okazas ĉiumarde je la 20a en domo de Uhrová-Křivancová, Třída Národní Svobody 23, kiu volonte akceptas somergastojn en sia hejmo.

*Planá—Plan.* E-Rondeto kunvenas ĉiumonate. En la stacidomo kaj kuracistaj atendejoj pendas informtabuletoj.

*Plzeň.* L a b o r i s t o j. 3. IV. festo okaze de la jubilea jaro. La programo konsistis ĉefe el lumbildparolado kaj recitado. Ĉeestis proksimume 100 p. el Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo. — 4. IV. solena jarkunveno de LLE. Oni elektis la malnovan laborkomitaton preskaŭ sen ŝanĝoj kaj decidis aranĝi en 1938, okaze de laborista ekspozicio, kelktagan tutŝtatan kongreson de laboristaj esperantistoj en Plzeň. — En aprilo funkciis kurso por 14 komencantoj. Instruis Gross kaj Pechoč. 1. V. la lokaj laboristaj s-anoj partoprenis en la laborista manifestacio. — 6. VI. organizis Okcident-bohemaj e-istoj propagandan ekskurson per aŭtobusoj al Františkovy Lázně (Franzensbad) kun

publika manifestacio antaŭ la tiea e-monumento. 65 p., inter ili ankaŭ la e-grupo de Aš (Asch). Reveture la karavano vizitis banlokojn Kynžvart (Königswart) kaj Mariánské Lázně (Marienbad) ĉie propagandante la lingvon. Ekskursoj okazas ĉiun dimanĉon kaj festtagon, konversaciaj kaj informigaj kunvenoj ĉiumerkrede en restoracio „Peklo" kaj en la laborista Domo en Doubravka, same en restoracio Hahn, Houškova ulice ĉiun ĵaŭdon. Skriba instruado por laboristoj estas organizita de la Dělnická akademie (kleriga institucio por laboristoj) kaj komencos 15. X. Ankaŭ aliaj kursoj estas preparataj. — EK partoprenis en la organizo de komuna soleno okaze de la jubilea jaro kaj de la manifestacio en Františkovy Lázně (Franzensbad). 4. IX. parolado de s-o Plzák pri lia e-a vojaĝado en Francujo. — „Okcidentbohemaj e-istoj", t. e. anoj de EAĈSR, GEL, SAT k. a. decidis leĝe registriĝi kiel unusola memstara societo, esperante tiamaniere pli efikajn rezultojn de sia komuna laboro.

*Praha.* EK. La ĝenerala jarkunveno okazinta la 26. II. reelektis prezidanto J. Šustr; la cetera komitato konsistas el jenaj ges-oj: Bárochová, Čermák, Janda, Koutek, Lešák, Požárek, Staněk, Turková. Vickomitatanoj estas Dlabač, Konopová; revizoroj Hromada, Staňková, Sviták. — 4. IV. ekskurso al historie memorindaj lokoj en urboparto Nusle; gvidis V. Echtner. — 9. IV. debato pri aktualaj problemoj de Praha; gvidis la prez. J. Šustr. — 16. IV. V. Echtner parolis pri Vyšehrad. — 18. IV. eskurso al Vyšehrad, gvidis V. Echtner. — 29. IV. la anoj ĉeestis la publikan paroladon aranĝitan de EAĈSR: Dro et Dipl. sc. pol. E. Landek, „La sociologio de artefaritaj lingvoj". — 30. IV. J. Bendová prezentis dialogon kun kantado. — Pentekoste vizitis la klubon 13 svedaj s-anoj, fervojoficistoj, gvidataj de Malmsten, Stockholm. — 21. V. Vespero de poeto Karel Hynek Mácha, dum kiu parolis M. Ginzová kaj Dro T. Pumpr. Oni recitis ĉeĥe kaj en e. la poemon „Máj", ĉefverkon de la solenata poeto, kiun majstre en e-on tradukis Dro Pumpr. — 28. V. parolado pri Svedujo kun lumbildoj. — 4. VI. parolis la prez., J. Šustr pri la tombo de Nekonata Soldato. — EK ankaŭ gastigis la Antaŭkongreson, kiun partoprenis pli ol 180 eksterlandaj s-anoj el 14 nacioj, vizitintaj la klubon; festparolis J. Glück k. a. Pasintan someron vizitis la klubon pli ol 200 eksterlandanoj el 16 nacioj. — 6. IX. Ĉe-metoda provleciono kaj malfermo de kurso gvidata de S. Pragano. Ĉeestis pli ol 160 p. Al la kurso aliĝis 44 p. — *Verda Stelo.* 3. VI. memorkunveno pri la mortinta Dro L. L. Goldberger, prezidinto de la societo. — *Blinduloj.* 9. III. ĝenerala jarkunveno reelektis la malnovan komitaton: prez. A. Kuchař, vicprez. s-o K. Jelínek, sekr-oj A. Dirnová kaj V. Miksch, bibl. M. Polednová, ĉiuj nevidantaj; konfidato R. Bloch, kas. A. Barochová, vidantoj. — 30. VI. okazis propaganda ekskurso al arbaro de Krč. Partoprenis ĝin blindaj s-anoj kaj vidantaj blindulamikoj, sume 108 p. — *Katolikoj.* En la katolika seminario formiĝis dudekmembra rondeto studanta e-on sub gvido de O. Mádr. Vigla internacia korespondado estas kulturata. — La Ligo de Kat. E-istoj elektis en sia ĝenerala jarkunveno, aŭguste, jenan estraron: prez. L. Dandová, vicprez. Dro. Dolák, sekr. F. Buhr, kas. F. Kozel. — *Virinoj.* La societo „Klub ženské národní rady" en Praha aranĝis la 2. VI. publikan vesperon, dediĉitan al propagando de e. Unue parolis faka instruistino J. Šupichová pri „Ĉeĥoslovaka virino kaj e.", poste sekvis provleciono de diplomita Ĉe-instruistino M. Adámková. Ĉeestis ankaŭ senatanino F. Plamínková, kiu favoras e-on. Bona semo por aŭtuna laboro! — Multaj gazetnotoj aperis pri la per e-a edziĝo inter s-anino de Praha kaj angla s-ano. — E-kurso estas ankaŭ en la programo de la Societo por subteni senokupan inteligentularon.

*Prešov.* Propaganda parolado de vojaĝanta propagandisto H. Vogelfang en junulara societo.

*Prostějov.* En aprilo-majo funkciis konversacia kurso. 7. V. Zamenhof-Vespero. Somere ekskursoj kun s-anoj el proksimaj lokoj (Olomouc, Bedihošť, Litovel).

*Přerov.* 5. V. E-rondeto aranĝis Amikan Vesperon por solene fini kurson. Dum la Vespero oni amase aŭskultis e-an radio-elsendon „Koro en floroj". — 28. V. ĝenerala kunveno de E-Rondeto.

*Příbor.* Fondiĝis loka grupo. Prez. A. Sattek, instruisto, vicprez. A. Šulerová, sekr. A. Kuchařčíková, kas. N. Tkadlec.

*Radvanice.* 4. IV. EK Nova Vivo aranĝis paroladon de H. Seppik pri Estonujo, lando de kantoj. — 5. IV. okazis la sama parolado en lernejoj.

*Rumburk—Rumburg.* Laŭ oficiala sciigo ĉesis propravole ekzisti la loka e-societo „Deutsche Esperantogruppe".

*Skalice u České Lípy—Langenau.* La loka grupo de GEL propravole disiĝis. Ĉi tie okazos la venontjara ĝenerala kunveno de laboristaj e-istoj (laŭ decido de la ĝenerala kunveno 1937).

*Slezská Ostrava.* 13. III. ĝenerala jarkunveno de E-Rondeto. Krom 30-membra anaro partoprenis 3 gastoj el Moravská Ostrava.

*Svitavy—Zwittau.* 14. III. lumbildparolado de Heger pri ties bicikla vojaĝado en la Alpoj. — 1. V. ekskurso kun laborkunveno al Litomyšl. — 12. IX. parolado de J. V. Šamla, Brno, pri „Radio kaj e." Kursojn por ĉeĥaj kaj germanaj komencantoj gvidas K. Karger.

*Tisovec.* EK Comenius kunvenas ĉiun duan ĵaŭdon je la 20a en sia klubejo, strato Muránská 56. 17. VI. ĝenerala jarkunveno. Sekr. estas J. Vítek.

*Trenčianské Teplice.* 15.—25. VIII. Ĉe-metoda rapidkurso por slovakaj instruistoj, gvidata de S. Pragano, organizita de la instruista societo „Uči-

telský domov". 20 p. La lokan movadon gvidas Břicháčová.

*Trnava.* La ĝenerala jarkunveno, 14. VI., de EK elektis jenan estraron: prez. N. Lelovits, vicprez. D-ro Lad. Herškovič, sekr. Irena Hirnerová, prot. V. Slabý. Pasintjare okazis du kursoj kun sume 33 p. La anoj vigle interkorespondas kun fremdlandaj s-anoj kaj individue propagandas sian hejmlandon. Kunvenoj ĉiumerkrede en restoracio de Ondriša (Panonia).

*Troubelice.* En marto funkciis kurso por komencantoj, gvidata de Marko Jurič, kiu faras multan propagandon en tiu ĉi loko kaj ĉirkaŭaĵo.

*Třebíč.* La 4 Schererparoladojn, nome: en la Baťauzinoj de Borovina pri Hollywood, publikan en la urbo pri Japanlando, en komerca supera lernejo (akademio) kaj burĝa lernejo pri Singapuro kaj en gimnazio pri Usono, aŭskultis 1200 p. Tradukis K. Koráb, direktoro de burĝa lernejo kaj Th. Kilian.

*Třinec.* Printempan Ĉe-kurson de E. Seppik partoprenis 85 p.

*Valašské Meziříčí.* Tie ĉi faris dum sia somera libertempa restado efikan propagandon A. Saltek el Příbor, kiu klopodis inklinigi al e. la lokan klerigan organizon. — Estis fondita klubo de katolikaj e-istoj gvidata de J. Šob, fotografisto.

*Vodňany.* 10. II jarkunveno de EK „La Progreso". La novelektita estraro konsistas el prez. Jos. Slepička, vicprez. Ot. Švec, sekr. M. Řežábková, kas. J. Rošický, bibl. Fr. Kadlec. La printempe interrompita kurso (pro malsano de gvidanto) estas remalfermota en novembro kun 22 p. Ĝi estas planata por 5 monatoj, po du horoj semajne. Instruas J. Slepička laŭ Ĉe-metodo.

*Warnsdorf.* 26.—27. VI. laboristaj E-Tagoj kun Fest-vespero, marŝo tra la urbo kaj ĉef-kunveno de Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio E-ista. Samokaze festis la loka e-ista grupo sian 10jaran ekziston, la asocio mem sian 5 jaran. La ĝenerala kunveno unuanime elektis Jeschke, Ústí n. L. (Aussig) asocia prezidanto kaj decidis aranĝi venontjaran ĉefkunvenon en Skalice u České Lípy (Langenau). — Rekomenco de regulaj kunvenoj okazis 9. IX. en Vereinshaus.

*Zlín.* La urbon vizitis karavano de 70 rumanaj e-istoj instruistoj, trarigardis la uzinojn de Baťa kaj lernejojn kaj daŭrigis la vojaĝon al la akvobaro de Dyje.

*Znojmo — Znaim.* 24. V. Fondkunveno de loka grupo de EAĈSR. Oni elektis jenan laborkomitaton: prez. Ph. Mr. Fr. Höfert, vicprez. St. Kroupa, sekr. R. Doležal, vicsekr. f-ino M. Heissig, kas. Ernst Himmel, vickas. Dro Walter Samstag. Oni sendis saluttelegramon al la prezidento Dro. Ed. Beneš, kaj akceptis tian de la centra estraro de EAĈSR. La kunvenon partoprenis 15 p. Regulaj kunvenoj konversaciaj ĉiumarde je la 20-a en strato Dolní česká 3.

*Žilina.* 23. IX. komenco de Ĉe-metoda e-kurso organizita de la loka Fremdlingva Rondeto, kiu havas viglan e-sekcion. Instruis S. Pragano.

---

## Esperantaj broŝuroj pri Ĉeĥoslovakio.

Depost kiam nia fervoja ministerio ĉesigis sian sekcion por fremdula trafiko, ni turnis nian atenton al la ministerio de komerco, kiu nun gvidas ĉiun propagandon en tiu direkto. Ni fine konvinkis tiun ministerion per ampleksa memorandumo pri valoro de nia lingvo por varbo de eksterlandaj gastoj kaj la ministerio eldonis laŭ nia propono belan gvidlibron, kiun ni plezure disponigis al niaj eksterlandaj amikoj ĝin petintaj.

Simile ni klopodis ĉe la urbestraro de Praha kaj nun estis eldonita por la esperantistaro bona nova broŝuro pri nia ĉefurbo. Kaj same estis ĉe la gimnasta societo Sokol, kiu laŭ nia peto presigis afiŝon kun esperanta teksto kaj esperantajn propagandilojn pri sia venontjara kongreso.

La neceson de tiuj eldonaĵoj ni pruvis per faktoj. Ni povis prezenti korespondaĵojn de centoj de fremdlandaj esperantistoj, kiuj vizitis laŭ nia instigo la respublikon. Ni pruvis ankaŭ alimaniere la grandan laboron de ni faritan en fremdulvarbado.

Ni dediĉas daŭre multe da atento kaj grandajn sumojn al tiu laboro kaj ni estas feliĉaj, se pro niaj klopodoj venas en Ĉeĥoslovakion ĉiam pli grandaj amasoj da esperantistoj ĉiulandaj kaj se ili estas kontentaj. Agante tiel ni facile pruvas, ke ĉiu esperanta presaĵo venos en ĝustajn manojn kaj ni havas pri tio valorajn dokumentojn.

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj devas kompreni, ke ne por ili estas tiuj invitiloj destinitaj. Ne sufiĉas ilia aserto, ke ili bezonas ilin por siaj eksterlandaj korespondantoj. Ni je nia sincera bedaŭro ne povos plenumi tiujn petojn, kvankam ni tre ŝatus servi niajn membrojn kaj samtempe ŝpari la altan eksterlandan afrankon. Sed korespondaĵoj de niaj ĉeĥoslovakaj amikoj ne estas por ni dokumentoj, kiajn ni por plua simila laboro nepre devas posedi.

Al ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas direktata la peto: Ne postulu de ni esperantajn broŝurojn pri Ĉeĥoslovakio nek direktu tiun peton al la eldonintaj institucioj! Tiuj petoj ne povos esti plenumitaj. Konsilu al viaj amikoj en eksterlando, ke ili direktu sian mendon senpere al ni aŭ al la eldonintoj.

Esperantaj organizaĵoj eksterlandaj postulantaj pli grandajn kvantojn da tiuj gvidlibroj, sendu siajn konvene motivitajn petojn ĉiam senpere al la eldoninto (ministerio, urbestraro ktp.)

---

**»ĈIELARKA STANDARDO«**

estas la unua kaj sola internacia kooperativa gazeto esperantlingva. Originalaj artikoloj el teorio, historio, nuna stato, praktiko kaj bibliografio de kooperativismo el ĉiuj landoj. Jara abono 7 sv. fr., pageblaj ankaŭ kvaronjare.

Interesatoj petu specimen-nron ĉe la Eldon-Kooperativo „Spółnota Pracy", Warszawa (Varsovio), str. Marszalkowska 149/9, Pollando.

## Esperanto kaj Skoltismo.

Dum la lastaj monatoj antaŭ la ĵamboreo ni legis multon pri la supra temo. En pluraj lokoj klopodis samideanoj esperantigi skoltojn veturontajn al Vogelenzang. Kaj la rezulto estis sufiĉe bona, tamen ne tute kontentiga. Laŭ raporto de Skolta Bulteno ĉeestis pli ol 250, do 1% de la ĵamboreanoj parolis Esperanton. La ĵamborea estraro komence malpermesis la kunvenon de la Esperantistaj skoltoj, poste lastmomente tamen permesis ĝin, sed oni povis nur malmultajn sciigi pri la kunveno kaj tial ĝi ne estis bone vizitita.

El la plej nova statistiko de Internacia Skoltoficejo en Londono ni sciiĝas, ke la nombro de la tutmonda skoltaro estas 2,812.074. Se ankaŭ tiu ĉi rilate estus la proporcio la sama kiel ĉe la ĵamboreanoj — tio estas 1% — tiam Skolta Esperantista Ligo devus havi preskaŭ 3 mil anojn kaj efektive ĝi havas la trionon. Ni do devas ankoraŭ multon labori ĝis la nombro de la Esp. skoltoj estos tiom alta, ke ankaŭ la ĉefuloj en I.S.O. rimarku nin. Pro tio ni ripete petas la helpon de la samideanaro. Propagandu senĉese inter la skoltoj de via urbo.

Skolta Bulteno, la oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo, kiu estas la sola ligilo de la Esp. skoltoj dissemitaj tra la tuta mondo, estas ankoraŭ tre modesta. Por iom kreskigi ĝian presfondon, Skolta Esp. Ligo decidis aranĝi kolektadon de uzitaj poŝtmarkoj, kiujn oni poste grandkvante vendos je profito de la presfondo de Skolta Bulteno. Bonvolemaj samideanoj, kiuj intencas subteni la Esp. skoltojn, eltranĉu el sia korespondaĵo la poŝtmarkojn kaj ilin sendu al Aleksandro Csáder, Bratislava I., Zámočnícka ul. 8. I. Ĉiu kvanto dankplene akceptota.

**Du surprizojn**

entenas nia prospekto pri la konata **internacia perfektiga skriba**

**ESPERANTO-KURSO.**

Ankaŭ por vi, ĉeĥoslovakaj Esperantistoj! Do senprokraste petu nian senpagan prospekton! Esperanto-Instituto „ISOSEK", Geleenstraat 66, HEERLEN, Nederlando.

## IEL en Ĉeĥoslovakio.

Ni ĉiuj konscias, kiel grave nin tuŝis la organizaj bataloj, kondukitaj dum pluraj jaroj kun tiom da vervo. Nia koncepto pri esperanto kaj pri esperanta organizo estis alia kaj Ĉeĥoslovakio, kiu estis dum dekjaro plej forta bastiono en la tutmonda movado, preferis stari flanke dum tiuj abomenaj luktoj. Flanke restis bedaŭrinde ankaŭ la kotizantaj membroj kaj tiel okazis, ke proksimume 1000 ĉeĥoslovakaj anoj foriris de internacia organizo.

Nun kvietiĝis iom la animoj kaj ni ĉiuj provas krei novan fortan bazon por internacia kunlaboro esperantista. La rezultoj de niaj klopodoj ĉiam ankoraŭ ne estas kompareblaj kun la ciferoj antaŭ la ekbatalo, sed ni devas esti kontentaj, ke ni tamen estas en IEL kvaraj en la vico, se ni konsideras membrojn individuajn. Honora restas nia loko, eĉ se ni ĝin komparas kun nombro de niaj loĝantoj kaj se ni faras saman komparon pri landoj aliaj.

Unua estas Britujo, kiu — kontenta pri posedo de centro en sia lando — ne nur donacis la domon, sed ankaŭ eminente laboras kun 564 aktivaj membroj. Sekvas Francio kaj Nederlando. Surprizas, ke Svedio, pri kies viglega movado kun dekmiloj da venditaj lernolibroj oni multe aŭdas, paŝas kun sufiĉe forta distanco post ni. Ĝin sekvas Usono, 7-a estas Belgio, 8-a Aŭstrio, 9-a Brazilo, 10-a Hungario, 11-a Norvegio, 12-a Polio, 13-a Danio, 14-a Aŭstralio, 15-a Italio kaj Japanio. Proksime staras laŭ membronombro Argentino kaj Nov-Zelando. Ĝenerale distingiĝas agrable niaj transmaraj amikoj.

Sume en 60 landoj estas hodiaŭ IEL-anoj, disvastiĝo certe impona.

Zorgo de ni ĉiuj estu, ke ni estu ankaŭ sufiĉe fortaj ĉie, kie ni jam laboras. Plej sincere kaj insiste ni alvokas la esperantistaron ĉeĥoslovakan aliĝi al IEL!

Novaj kotizoj de IEL
por membroj de EAĈSR en 1938:

MJ (membro kun Jarlibro) . . . Kč 20·—
MA (membro kun Jarlibro kaj revuo Esperanto Internacia) . . Kč 50·—
MAH (membro kun Jarlibro k. semajna Heroldo) . . . . . . Kč 128·—
MS (membro kun Jarlibro, monata revuo kaj valoraj libraj premioj) Kč 153·—

Ĉion pagu al la poŝtŝparkasa konto de la Asocio n-ro 9602 aŭ 12371.

# Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

**Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de EAĈSR afrankite por la notita sumo.**

*Dr. Ing. Eugen Wüster: Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko.* Trad. Dr. E. Pfeffer. Eld. Literatura Mondo, Budapest, IX. Soroksári str. 38. 124 pĝ. 20x13 cm. Prezo broŝ. Kč 19·—, bind. Kč 27·—. Dua volumo de la lingvo (A) serio de AELA 1935.

Esperantlingva eldono de la verko de Wüster signifas gravan faron, kiu ebligas al multaj samideanoj konatiĝi kun ĉiuj faktoj gravaj laŭ vidmaniero de uzo de Esperanto por lingvo-normigaj celoj. La faro de la AELA-eldonejo estas despli salutinda, ĉar la prezo de la verko malfacile kompostebla estas efektive malalta.

*Nia mondo.* Lerno-libreto por infanoj. Unua volumeto *„La malgranda mondo"*. Verkita de Annie Rebers, ilustr. de T. Langeberg. Eld. Federacio de laboristaj esp-istoj en la regiono de nederlanda lingvo, Amsterdam. 48 pĝ 16x24 cm. Prezo Kč 5·30. — Lernolibro por infanoj 10—13 jaraj, laŭ kiu pli ol 1000 geknaboj nederlandaj estis instruitaj dum la instrujaro 1936-37. La 40 lecionoj destinitaj por 10-monata instruado, kun bone elektitaj simplaj temoj, povas certe liveri sufiĉan fundamenton de la lingvo al infanoj. Ni ĝojas je pluaj du volumoj (poparte ili aperas en la infangazeto La Vojo), kiuj devas plivastigi la lingvoscion de malgrandaj kursanoj.

*La Juna Vivo. Internacia kantaro.* Eld. La Juna Vivo, West-Graftdijk N. H., Nederlando. 34 kantoj kun muziknotoj. 64 pĝ 16x12 cm. Prezo Kč 7·—. Facile kanteblaj kantoj — inter ili tri de nia membro J. V. Dolinský — kun ĝojo akceptotaj de la esperantistaro. Esperantistoj ŝatas kanti, sed plej multaj kantoj estas pro manko de presitaj tekstoj sole buŝe transdonataj. Se iuj estas internacie disvastigitaj, ni devas danki ĉefe niajn trubadurojn. Tiel nerapide kreskas la esperantista kantoprogramo kaj tial ni antaŭvidas bonan disvastiĝon de la libreto.

*Julio Baghy, La verda koro.* Facila romaneto el la vivo de esp-istoj en Siberio, por komencantoj, por daŭrigaj kursoj. Eld. La nederlandaj geamikoj de la aŭtoro. 100 pĝ 16x20 cm. Prezo Kč 17·60. Jen interesa romano, skribita per plej facila stilo, bone uzebla en kursoj por progresintoj. La kortuŝa temo malkaŝas la majstran plumon de Baghy.

*Muuses Esperanto-Biblioteko.* Unu volumo 32--36 pĝ 13x20 cm Kč 5·80, kompleta serio (10 volumoj) Kč 42·—. Sub redakto de J. Glück, T. Jung kaj J. H. J. Willems intencas la eldonejo J. Muuses en Purmerend (Nederlando) aperigi ĉiujare dek malmultekostajn volumetojn, kiuj enhavos bonan literaturon diversspecan. La unua serio pruvas la lertecon de la redaktoroj. Enhavo estas interesa por ĉiu esperantisto, lingvo bonega. La unuaj dek titoloj: 1. J. Glück, La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo. 2. M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak, Rusaj noveloj. 3. Teo Jung, De Muheddin ĝis Mundlatin. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj. 4. Joseph R. Scherer, Tra Usono kun ruliĝanta hejmo. 5. J. Glück, El la klasika periodo de Esperanto (Grabowski kaj Kabe). 6. Zamenhof, Kongresparoladoj. 7. Zamenhof, Kongresparoladoj. Dua parto. 8 A. Petöfi. La avo. 9. Bengoa, La ĵusnaskito. 10. J. Glück, La jubilea kongreso de Esperanto 1912.

*E. Podzimek, Eksplodo de l' paco.* Eld. la aŭtoro. Warszawa, Dluga 28/47. 16 pĝ 14x19 cm. Prezo 20 groŝoj. Verketo de sincera pacifisto, kiu devas interesi ĉiun amikon de la paco. Kun la aŭtoro ni volas kredi, ke estas eble ŝanĝi la nunan mondon per pacaj rimedoj.

*Arĝenta duopo.* Jubilea libro pri Baghy kaj Kalocsay. Eld. Literatura Mondo, Budapest. Unua volumo 208 pĝ 23x15 cm. Prezo Kč 29·—. Dua volumo 34·80 Kč. Plej famaj homoj en Esperantujo kunvenis en tiu libro por honori niajn du grandajn poetojn. La dua volumo enhavos pecojn el la verkaro de Baghy kaj Kalocsay. Ĉiu literturamanto devas posedi tiun ĉiverkon.

*Verda Stacio, Esperanta Almanako de la Ĉeĥoslovaka Radio.* Redaktis Dalibor Chalupa kaj Jiří V. Šamla, eld. Ĉeĥoslovaka Radio. 80 pĝ 15x21 cm, arta kovrilo, luksa papero, ilustrita. Prezo Kč 10·—. Estas por ni granda plezuro, se ni povas recenzi libron tiel imponan. La stilo estas objektiva, senpatosa, kaj tamen vi legos kun kreskanta scivolo kaj intereso, kiel naskiĝis kaj maturiĝis la Verda Stacio en Brno. Unuopajn artikolojn verkis radio-fakuloj, inter aliaj la prezidanto de la ĉeĥoslovaka radio Dro Ladislav Šourek kaj la direktoro de la Verda Stacio Antonín Slavík. Kiu estas amiko de esperanta radio-elsendado, certe ne hezitos aĉeti ĉi tiun dokumentan verkon. Kaj kiu legos ĝin, certe fariĝos fervora aŭskultanto de la regulaj esperanto-programoj de Verda Stacio. Bona propagandilo kaj taŭga donaco al eksterlandaj amikoj. Multaj ilustraĵoj intimigos al Vi tiujn homojn, kiuj kreas la programojn, kaj ankaŭ ilian medion, en kiu ili laboras.

*Ora Libro de la Esperanto-movado.* Red. V. Bleier kaj E. Cense. Eld. LKK kaj UEK en Varsovio 1937. Ilustr., 240 pĝ 23·5x15·5 cm, prezo 22·20 Kč, mendebla ĉe EAĈSR. Verko inda por la jubilea jaro. Ni ekscias nekonatajn detalojn el la „pratempo" de Esperanto, pri kiu skribas la veteranoj de la movado. Ankaŭ la okazaĵoj pli bone konataj estas iluminitaj laŭ tute novaj flankoj. Kiomfoje estis la esperoj trompitaj! Kiom da laboro, ŝajne vana, por vivteni la malfortan planton de la ĵus semita „nova sento". Kortuŝe ni legas pri la baraktoj de la movado en la unuaj jaroj, en la tempo de Ido-skismo, kaj pri la persistemo de la Esp.-adeptoj. La libro finas per „paĝoj de profetaĵoj", sur kiuj niaj eminentaj aktivuloj penas prognozi la estontecon de la verda afero en la paso de la venontaj 50 jaroj. Estas amuze legi sinsekve tiujn variantajn opiniojn, jen plenajn da espero, jen da skeptikeco. Legu! Eksteraĵo brila, lingvo eminenta.

*Internacia Konferenco, raportoj kaj konkludoj.* Eldonis Internacia Ekspozicio de Arto kaj Tekniko en la moderna vivo, Paris 1937. 144 pĝ 14x21 cm, prezo Kč 12·—. La libro estas grava dokumento pri la laboroj de la Internacia konferenco, okazinta en Paris 14.—17. majo 1937 sub la patronado de s-ro Albert Lebrun, prezidanto de la Franca respubliko en la kadro de la Internacia Ekspozicio. Ĝi enhavas raportojn de la sekcioj 1) Esperanto en lernejoj, 2) Internacia trafiko, 3) Sciencoj puraj kaj aplikataj, 4) Intelektaj interŝanĝoj. Oni ne povas sufiĉe aprezi verkon tiom multsignifan, kiu digne viciĝas al la Esp. Enciklopedio, kaj diversflanke ĝin kompletigas. Havinda por la aktivuloj.

*Ismael Gomez Braga: Veterano?* Eldonis Gazeto de Ameriko, Rio de Janeiro 1937. 128 pĝ 13x18 cm. Prezo broŝ. Kč 12·—, bind. Kč 18·—. Kiam mi legis ĉi tiun priskribon de brazila veterano pri la laboroj por Esperanto, ĉiam ruiniĝantaj kaj ĉiam rekomencantaj, mi havis impreson pri homo, perdita en praarbaro aŭ droninta en oceano. Kiom aŭdaca ideo: esperantigi la vastege vastan teritorion de Suda Ameriko, en kiu oni povas interkompreniĝi per unusola lingvo, ne bezonante alian helpilon. Kaj tiu samideano, jam depost 30 jaroj, ĉiam esperas kaj kredas, ke li preparis kaj ĉiam preparas vojon por estonteco. Nu, nun li povas jam fieri pri rezultoj... Legu! Lingvo tre bona; kelkfoje nekutima uzo de refleksivo.

*Alojz M. Macek, Malá učebnica esperanta.* Eld. Spolok sv. Vojtecha, Trnava. 76 pĝ 11x15 cm. Prezo Kč 6·70. Nova slovaka lernolibro, verkita de sperta propagandisto. Ĝi certe multe helpos pli rapidan disvastiĝon de nia lingvo inter la slovakoj.

*L. de Spolarich, Hungaraj brodaĵoj.* Eld. Hungara Esperanto-Federacio, Budapest. 24 pĝ 15x23 cm, el tio 19 pĝ da ilustraĵoj. Prezo 7 Kč. Interesa verketo, verŝajne unika de tiu speco. Faka priskribo de hungaraj brodaĵoj, kies bildoj atestas la artistan guston de niaj najbaroj. Iuj estas rimarkinde similaj al laboraĵoj slovakaj.

*XVII-a Somera Universitato. — Int. Konferenco de instruistoj. — Int. Konferenco de virinoj.* Dum la XXVIII-a universala Kongreso de Esperanto en Wien, Aŭg. 1936. Kompilita de kortega konsilisto Hugo Steiner, Int. Esp. Muzeo, Wien. 1937. 64 pĝ 23x15 cm Kč 16·—. Unuan fojon estas tie ĉi publikigitaj ĉiuj prelegoj de la kongresa Somera universitato kaj de la du cititaj dumkongresaj konferencoj. Rezultis el tiu kompilo libro treege interesa kaj instrua. H. Steiner havas grandan meriton pro tiu ĉi faro, kiu devus esti konservita por ĉiu kongreso. Ni tre rekomendas al niaj kluboj, ke ili mendu ekzempleron.

*Molière, La nobela burĝo.* Tradukis Richard Levin. Ilustris Bernard Aldebert. Lyon 1937. Kolekto de Lyona Universitata Esperanto-Klubo. 74 pĝ 23x14 cm, Kč 13·—. La klasika verko franca en tre bona traduko de konata aktiva samideano en Lyon. La libro estas tre bela ankaŭ laŭ tipografia aranĝo. La ilustraĵoj estas valoraĵo por si mem. Ni tre rekomendas akiron de tiu libro precipe al ĉiu kluba biblioteko.

*Julius Glück kaj J. H. Willems, La verbo en Esperanto.* Teorio kaj praktika uzo. Zutphen. W. J. Thieme & Cie. 1937. Pĝ 48, 23x15 cm. — Ŝajnas, ke temo pri uzo de verbaj formoj estas nun tre aktuala en Esperanto. Tiu ĉi libro traktas ĝin per lingvo klara kaj donas tre instruajn modelojn de la taŭga uzo. Eble la ekzemploj estas ie eĉ tro simplaj. Sed certe tiu evidenteco utilos al tiu, kiu komencas enprofundiĝi en detalan studon de verbo-uzo.

*Marista rakonto.* Kanto kun piano. Laŭ angla kanto reverkita de F. W. Buenting. Eld. Esp. Reprezentantaro Brusela, Bruselo. Prezo Kč 4·—. Bonhumora kanto, bone kantebla. Ni tre rekomendas al niaj kluboj ĝian akiron kaj nia TRAKT ĝin afable aŭdigu el la Verda stacio de Brno! Ĝi certe plaĉos.

*K. Marks kaj F. Engels, Komunista manifesto.* 3-a eld. kun antaŭparolo de Lucien Lora kaj kun portreto de Marks. Eld. SAT, Paris. 56 pĝ 12x18 cm. Prezo Kč 4·50. Reviziita traduko de la fama manifesto. Nomo de la lerta tradukinto ne estas notita.

*Komuna Kantlibro,* redaktita de H. W. kaj N. Holmes, eld. de The Esperanto Publishing Co., Ltd., Anglio. 64 pĝ 13x20 cm. Prezo Kč 8·20. Enhavas 36 kantojn, el kiuj 33 estas kun notoj. Tre amindaj kantoj por komuna kantado. Komparu unu specimenon: „Ho mia bela! Kun rido hela, ho korfidela, revenu min! Car mi konstante, sur lit' kuŝante, dolorĝemante sopiras vin." Rekomendinda al la societoj.

L. L. Zamenhof en portugala lingvo: *Essência e futuro da idéia de lingua internacional.* Tradukis Ismael Gomez Braga, Ediçao de Lingua Auxiliar Rio de Janeiro, Brazilo. 120 pĝ 13x19, broŝurita. Enhavas krom la traduko de la konata verko ankaŭ esperantan kaj portugalan tekstojn de la gramofondiskoj pri modela elparolado de Esperanto. Prezo ne notita.

Ŝajnas, ke la vortaroj kaj lernolibroj ĉiam estos la plej preferata kaj eldonata varo en Esperantujo. Ni raportis jam pri „Slovník česko-esperantský" de A Berka (Eldonejo de Malkaraj Libroj, Brno, V Jirchářích 8). Nun aperis ĝia ĝemelo *Slovník esperantsko-český.* Aŭtoro kaj eldonejo la samaj. 80 p 10x14 cm, prezo 4·— Kč. Ambaŭ havas ĉiujn avantaĝojn de la poŝ-vortaroj: ili estas tre oportunaj kaj praktikaj por vojaĝado, sed kompreneble mankas en ili detalaj difinoj kaj distingo de nuancoj. La eldonejo igis ambaŭ vortarojn bindi en unu volumeton, kostantan 9·80 Kč. Tamen la ekzemplero, kiun ni ricevis por recenzi, estas bindita plej malzorge: Post la paĝo 16 de la ĉeha-esp. vortaro sekvas la paĝoj 17-32 de la esp.-ĉeha, poste 33-48 de la ĉeha-esp., kiuj dufoje ripetiĝas, kaj la paĝoj 49-64 mankas. Al la eldonejo ni rekomendas revizii tutan provizon de siaj binditaj vortaroj, ĉar ni konstatis saman eraron ripete. — Preseraroj malmultaj kaj ne gravaj. Unu menciinda: Fuĝi kaj ne fugi estas uprchnouti. Kelkaj korektindaj aŭ kompletigindaj terminoj: rozviklati—ŝanceli, ne ŝanceliĝi; rýč—pioĉo, ne fosilo; pilíř—pilastro, ne kolono; ekveki (kial ek-?)—vzbuditi, ne probuditi se; čelist—makzelo, ne magzelo; zlomek—frakcio, apud partumo; výtah—lifto, apud eltiro (kvankam en alia senco); záplava—inundo, apud superakvo. Ĉiuj menciitaj vortoj estas oficialaj. Plue obřezati, diras Zamenhof cirkumcidi, ne ĉirkaŭtranĉi; umučení Páně — mi preferas Pasiono, kiun registras Parnasa Gvidlibro, ne Pasio, ktp. Ĝenerale: bona verketo.

*F. Omelka, Aventuroj de Antonio.* Eldonejo de Malkaraj Libroj, Brno II., ČSR; 60 pĝ 12x16 cm, ilustr., prezo 5·50 Kč. Senpretenda originala rakonteto pri knabo el Moravio, kiu sopiregas vojaĝi, lernas multajn lingvojn, ankaŭ esperanton (kvankam ni legantoj ne scias, ĉu ĝi utilis al li), kaj poste travivas aventurojn en Italio, Tunizio kaj Saharo. Lingvo bona. La aŭtoro trouzas la komenc-aspektan prefikson de la verboj. Kial ekpreni, ekkapti, ekaŭdi, ekpremi, ekkompreni, ekpensi, se sufiĉas preni, kapti ktp.? Ekmalheliĝi, ekmalsaniĝi, ekpaliĝi, estas pleonasmoj; korekte estas: malheliĝi, paliĝi (aŭ ekpali) ktp. Ekhaltiĝi estas evidenta eraro anstataŭ halti. La rakonteto tamen bone legiĝas.

**Kuraĝigu la eldonadon en Brazilo,**
mendante rekte al Livraria Editora da F. E. Brasileira — Av. Passos, 30, Rio de Janeiro, *la unuan libron originale verkitan en Esperanto kaj presitan en Brazilo:*

**VETERANO?**

de Ismael Gomez Braga; prezo afrankite broŝ. 1·50 sv. fr., aŭ 0·40 us. dol.; tole bind. 2·50 aŭ 0·60, aŭ egalvaloro.

**Germana knabino 24-jara** serĉas okupon laŭeble en ĉeĥa regiono kiel vendistino aŭ kasistino. Scias parte ĉeĥe, havas plej bonajn rekomendojn. Ŝi akceptus ankaŭ alian similan postenon. Detalojn donas oficejo de EAĈSR, Praha 47.

**Adreso de la oficejo** de Esperanto-Asocio en ČSR provizore ĉiam ankoraŭ: Praha 47 aŭ Praha XIX., Uralské nám. 447. Ni petas ne uzi alian adreson. Korespondante kun la Asocio, *ne forgesu aldoni respondan afrankon!*

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.